

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 60 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

1984 - 3

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la Mondo

Mediteranea Malto (2) K. Mallia

Pri Niaj Literaturaj Trezoroj Ĵak Le Puil

Paĝo de la Geknaboj

Tut-Anĥ-Amun H. Röllinger

Fantaziaĵo Pri Gastronomio
De helikoj ... al geedziĝa festo Paule Potin

La Aventuroj de Fifi Stultul Mik

Por via distro

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras, ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

« Post trisemajna restado en Gresillon, mi donu al vi mian impreson. Unue tre ĝenerale : laŭ mi la etoso estis ege agrabla kaj la organizo kaj prizorgado estis modelaj... Nepre Gresillon restu tia, kia ĝi estas nun ». Tiuj kelkaj linioj estas ĉerpitaj el unu el la leteroj ricevitaj post la unua periodo. Ĝi estas aparte gratulplena kaj plezurigas nin kompreneble. Nia amiko aldonas : « Gratulon al la tuta skipo ! ». Dankon, amiko ! Proponi al vi etoson, kiu plaĉas al ĉiuj (ne multaj neniam revenas) eblas nur dank'al tutjara laboro de skipo. Tio, kion oni vidas kaj ŝajnas normala dum la somero estas nur la rezulto de konstanta batalo de skipo kontraŭ la naturo. Ni amas la naturon kaj la naturo amas nin. Tiom, ke ĝi emas ĉirkaŭbrancumi nin... ĝis sufoko : ĝi akvumas niajn herbejojn ĝis ravinigo ; ĝi forblovas la mikrobojn kaj ankaŭ la tegmentardezojn. Por ke la parko ne fariĝu tro densa ĝangalo estas necese bremsi la amajn impulsojn de la naturo kaj eventuale ripari la damaĝojn. La laboro estas konstanta, kelkafoje refarenda, ĉiam multekosta je energio kaj mono. Ĝi tamen ne estas spektinda pro tio, ke ĝi alportas nenion novan, nur provas konservi uzeblan teritorion.

Kio okazis ĝis nun meze de aŭgusto, en Gresillon ? Raporto estos farita post la oktobra kunveno de la estraro. Tio, kion la raporto eble ne mencios estas la granda diferenco inter la diversaj periodoj. Diferenco kaŭzita de la nesimilaj programoj, sed ankaŭ de la ĉeestantaro ĉiam simpatia kaj amikeca, sed pli malpli vigla, partoprenema. Tio ne estas novaĵo. Kiel kutime. ankaŭ ĉijare personoj, kiuj aliĝis unusemajnon « por vidi » bedaŭras, ke fine de tiu semajno ni ne povas disponigi al ili ĉambron por kelkaj pliaj tagoj. Jam aliĝis por la venonta jaro deko da ĉijaraj ĉeestantoj, kiuj tiamaniere post konfirmo « havos ĉambron ». Denove kelkaj aliĝintoj ne facile adaptiĝis almenaŭ ĉe la komenco. Ili emas alporti en siaj valizoj ankaŭ grandan parton de siaj personaj kutimoj, ĉefe pri nutrado. Ili ne ĉiam tuj komprenas, ke ankaŭ la menuo estas komuna, ke ne eblas kuiri specialajn manĝaĵojn pro manko da spaco kaj ĉar la tuta labortempo de la servistaro estas dediĉata al la tuta komunumo. Sed ĉio aranĝiĝas, kiam la koncernataj amikoj konstatas, ke en la komuna vivo, en la komuna menuo oni ankaŭ povas plenumi siajn personajn dezirojn kaj satigi sian apetiton.

Venontjare tre verŝajne okazos dum la dua au tria periodo specialaj aktivaĵoj : « Informatiko kaj Esperanto » kaj « Teatro kaj Esperanto ». Ĉu tiuj titoloj allogas vin ? Diru al ni, kaj jam planu vian venontsomeran programon kun kelkaj semajnoj en Gresillon, kompreneble.

Esperanto tra la Mondo

LA UNIVERSALA KONGRESO 1966 VIGLE PREPARATA EN ĈINIO

De nun, la esperantistoj povas... ŝpari monon por ĉeesti kongreson sendube historian kaj memorindan en Ĉinio post du jaroj (1986).

Samtempe kun forta disvolviĝo de la nacia esperanto-movado, vigle preparîĝas la universala kongreso en Pekino, por la ĉisupre indikita jaro.

Invitite de Ĉina Esperanto-Ligo, reprezentantoj de U.E.A., s-ro Y. Umeda, ĝia vicprezidanto kaj s-ro S. Milojeviĉ, ĝia ĝenerala direktoro, iris al Pekino inter la 17a kaj la 23a de majo.

Dum tiu restado en Pekino, ili renkontis diversajn oficialulojn por la preparado de la 71a Universala kongreso.

Laŭ la revuo « El Popola Ĉinio », s-ro S. Milojeviĉ diris, ke la rezultoj atingitaj dum la vizito « estas pli multaj ol kiom UEA atendis ».

En la numero de julio de tiu revuo, s-ro Hoŭ Ĝiping, resume sed impresige raportis pri la nunaj ĉiuflankaj atingaĵoj de la esperanto-movado en Ĉinio, kiuj eĉ altiris la atenton de usonaj ĵurnalistoj.

Por la dua fojo, brita esperantistino, s-ino Nancie Durham, aranĝis viziton de eŭropaj esperantistoj en Ĉinio (19a de aprilo-10a de majo). La grupo vojaĝis 4.000 km kaj estis akceptita dum renkontoj kun la lokaj esperantaj grupoj.

Por prepari la viziton de la lando, ĵus aperis en esperanto du bildlibroj : « 40 vidindaj lokoj en Ĉinio » kaj « Pitoreska Pekino ».

Oni povas esperi, ke la kongreso 1986 en Ĉinio grandioze malfermos la serion de manifestacioj antaŭviditaj por la 100a datreveno, en 1987, de la lingvo esperanto.

DUA KANZONA-TEATRA FESTIVALO EN PARIZO

Unuiĝo Franca por Esperanto organizos la 2an festivalon kanzonan-teatran de Parizo, la lastan semajnfinon de novembro 1984, t.e. la 24an kaj la 25an.

Kvankam la definitiva programo estas ankoraŭ ne tute aranĝita, U.F.E. ricevis konsenton partopreni de la Teatro esperanto de Parizo (TESPA), de Suzanna, F. Chevrier, R. Ruba, J Le Puil kaj de la grupo de moderna muziko Amplifiki. Verŝajne aliaj artistoj, kiel i.a. La Ruza Kruĉo, venos.

Kiel jam okazis pasintan jaron, la festivalo estos libervole partoprenebla en la diversaj vesperoj, kontraŭ enirpago (abono denove ebla). U.F.E. peros kontaktojn kun hoteloj.

TEATRAĴO PRI ESPERANTO EN LA BRITA TELEVIDO

La 27an de majo, la brita televida kanalo BBC 2 elsendis je 19 h. 15, sepdek-minutan teatraĵon, en kiu esperanto estis centra en la temo. La teatraĵo titoliĝis « High Hopes » (Altaj esperoj), verkita de Jill Hyem. En ĝi rolis pluraj vaste konataj britaj geaktoroj, kaj japana aktoro.

Multaj britaj esperantistoj konsideris la teatraĵon bonega informado pri esperanto. Cetere, oni pli kaj pli ofte menciis esperanton lasttempe en britaj programoj.

NOVAJ LIBROJ

— Oni lastatempe publikigis plurajn librojn originale verkitajn en esperanto de nova « stelo » de nia literaturo : la hungara Istvan Nemere. Post la novelaro « La naŭa kanalo », aperis sinsekve : « La fermita urbo », sciencfikcia romano, « La blinda birdo », romano, pri problemo de rasismo kaj diktatoreco, « Sur kampo granita », romano kun militkrima temo, « Febro », psikologia kaj detektiva romano. Jam oni anoncas la aperon baldaŭan de « La Monto », romano en kiu ŝvebos sekreto.

— « La vivo de d-ro L.L. Zamenhof en bildoj ». 128-paĝa, grandformata bildlibro, kun 114 nigrablankaj fotoj kaj 25 mapoj, ĉio kronologie prikomentita.

— « Ĉu vi konas la teron ? ». Enkonduko en la geologion de d-ro Endre Dudich ; 150 paĝoj pri ĉiuj aspektoj de la temo.

— « Kiuj semas plorante... ». Romano originale verkita en esperanto de Eva Tofalvi kaj Oldrich Knichal (premio Raymond Schwartz 1980). 107 p.

— « Elpafu la sagon » (el la buŝa poezio de la mondo) de Tibor Sekelj.

— Ni atentigas niajn interesitajn legantojn pri la jam havebla literaturo en esperanto pri la komputada temo :

Krom la kvaronjara 64-paĝa magazino « Internacia Komputado », aperis sufiĉe multaj libroj kiuj, interalie, entenas la prelegojn de la faka renkonto « Interkomputo 82 » de Budapeŝto. (Konsultu la esperanto-katalogon 84-85 de U.E.A., p. 237-239).

— La konata esperantista poeto Edwin de Kock, el Sud-Afriko, aperigis sian lastan poemaron : « Saluton al la Suno ».

— Gaston Waringhien estas la aŭtoro de rimarkinda (dulingva) antologio de la franca poezio, sub la ĝenerala titolo : « Tra la parko de la franca poezio ».

Aperis jam la tria volumo : « La romantika periodo » (fakte, multe pli ampleksa).

— Ni signalas la aperon de dii bonaj tradukaĵoj el la franca literaturo : « Boule de suif » de Guy de Maupassant, en traduko de Fernando de Diego kaj « Nokta flugo » de Saint-Exupéry, tradukita de Henri Vatré.


— Aperis nova eldono de « Apenaŭ bukedeto... », poezioj tradukitaj el la franca de Roger Bernard, kies talento estas bone konato.

VI JAM POVAS NOTI...

Krom la pariza kanzona-teatra festivalo, oni anoncas :

— Staĝon pri librotenado kaj administrado, organizitan de U.E.F. kaj rodanaj esperantistoj, en Lyon, 21-22ajn de oktobro 84.

— Internacian Esperanto-Semajnon en Nice, 30an de marto-6an de aprilo 85. Inf. S-ro Llorens, Les Hortensias 2, 121 bis, Bd Napoléon-III, 06200 Nice.



MEDITERANEA

MALTO (II)

NORMANDA KAJ ARABA REGADOJ

En 1090 preskaŭ tuta Sicilio submetiĝis al Roĝero I-a, kiu, por esti certa, ke neniu alia atakos lin sude, decidis alveni Malton. Tion li faris en 1090. Post interkonsenta submetiĝo fare de la araba estro, Roĝero reveturis al Sicilio, sed la Araboj nome de la Normandoj daŭrigis regi la insulon. Nur en 1123, Malto tute aneksiĝis al la normanda regno de Sicilio sub Roĝero II-a. Sed oni ne forpelis la Arabojn for de la insulo. La araba influo sur la loĝantaro kaj sur la tuta insularo estis tre profunda. Kiel ekzemple, ni menciu la nomojn de la urboj kaj de la vilaĝoj, kaj eble la lingvon mem.

Malta iĝis parto de la sicilia regno, kio daŭris kvin jarcentojn dum kiuj Malton regis sinsekve la normandaj, la germanaj kaj la hispanaj reĝoj. Estis la feŭda epoko. Tiam Malto iĝis kiel viando vendata de unu regno al alia.

Post tiom da ŝanĝiĝoj, da eltordoj, da submetiĝo, malta delegacio fine vizitis reĝon Alfonson. La delegacio plendis pri la situacio de Malto ĉiam servutula kaj subpremata ; ĝi petis, ke Malto denove dependu rekte de Sicilio kiel antaŭe. Tion la reĝo akceptis, samtempe aldonante certajn avantaĝojn. Ĉi tiun dokumenton fare de reĝo Alfonso la Maltanoj akceptis kiel la Grandan Ĉarton de sia libereco. Plie, Alfonso nomis Malton « Nobla Insulo kaj Gemo sur mia krono ». Ekde tiu tempo, la ĉefurbo de Malto, anstataŭ MDINA, eknomiĝis NOTABILE, kvankam la popolo daŭre uzis la malnovan nomon.

LA KAVALIROJ

Pro la tiutempaj batalantaj Turkoj, kiuj intencis invadi Eŭropon, Malto bezonis esti defendata. La Maltanoj solaj ne kapablis venki la timindajn Turkojn. Por tio sufiĉis nek la observturoj nek la soldataro nek la eta hispana garnizono. La Kavaliroj de S-ta Johano, timinda marmilita potenco, eĉ tre riĉa, estis la nura solvo por Malto, meze de la mediteranea maro kaj ŝtupo al Eŭropo.

Tiel, la lasta reganto hispana de Malto estis Karolo V-a, la unua alte taksante la strategian valoron de la insulo. Do en 1530, li fordonis ĝin kiel reĝan feŭdon al la kavalira ordeno de S-ta Johano, nun konata kiel la « Kavaliroj de Malte », kondiĉe ke se aŭ kiam la kavaliroj forlasos la insulon, la suvereneco aŭtomate reiros al la sicilia krono.

Unu el la ĉefkavaliroj, La Vallette, konstruis la novan ĉefurbon nomitan honore al li VALLETTA. Tiel, MDINA ĉesis esti la ĉefurbo.

Dum sia regado, la ĉefkavaliroj multe utilis al la insularo sed, ĝenerale, ili subpremis la popolon. Estas vere, ke la kavaliroj plibeligis la insulon per belegaj grandaj palacoj, sed samtempe la popolon ili furiozigis.

NAPOLEONO KAJ LA BRITA HELPO

La 9-an de junio 1798 Napoleono apudis Malton. Liaj soldatoj surteriĝis. La kontraŭstarantoj ne povis rezisti, ĉar anstataŭ municion



Malta Kavaliro

ili trovis nur karbon kaj sablon. Estis do subskribita kapitulacia konvencio : la ordeno transdonis al la franca respubliko ĉiujn rajtojn de suvereneco kaj posedaĵojn en la malta insularo. La kavaliroj devis forlasi Malton nur post tri tagoj. Sed la malta popolo ne povis alkutimiĝi al la tute nova kaj fremda franca regado, kvankam liberiga. Fine ili senpacienciĝis, kiam la Francoj ekvendis la ekleziajn posedaĵojn. Per armiloj la popolo forpelis la francajn soldatojn de la aŭkciejo kurigante ilin ĝis la ĉefurbo Valletta kaj ilin tie ĉirkaŭsieĝis. Dume, la Maltanoj starigis provizoran registaron ekster la ĉefurbo por administri kaj organizi la rezistadon.

La unua ago de ĉi tiu provizora registaro estis peti helpon de la napola reĝo kaj de lordo Nelson. Ĉi tiu tuj alhelpis. La sieĝo de Valletta daŭris pli ol dek du monatojn. En 1801, la franca garnizono cedis pro malsatego. En 1814, la traktato de Parizo atentigis, ke Malto kaj la aliaj ĉirkaŭinsuloj apartenu al Granda Britujo.

LA MODERNAJ TEMPOJ

Dum la unua mondmilito en 1913, Malto reakiris sian strategian valoron, dufoje renoviĝintan dum la dua mondmilito, kiam en aprilo 1942 la angla reĝo donacis al la insulanoj la « Georgan Krucon », kiel poreternan memorigon pro la firma heroeco ĉu de la garnizono ĉu de la popolo.

En 1964, pli precize la 21-an de septembro, Malto estis aŭtonoma. La 15-an de decembro 1975, Malto iĝis respubliko kun la unua malta prezidento. Kaj je noktomezo de la 31-a de marto 1979, la lasta angla soldato forlasis la insulon, kio igis Malton, almenaŭ teorie, vere libera kaj sendependa. Nun Malto estas neŭtrala kaj membro de la nealiancaj landoj.

Le ĉefaj kontribuoj al la malta ekonomio estas : la turismo, la industrioj, la ŝipriparejoj, la terkulturo, la filmindustrio, la fiŝkaptado.

La sunbrila insulo, de Homero nomita « la umbiliko de Mediteraneo », moderna Malto havas novan vizaĝon.

La fluglinio AIR MALTA estas ĉiam preta servi kaj al Maltanoj kaj al alilandanoj. Multaj turistoj ŝatas Malton pro la milda temperaturo. Fakte, somere, la maksimuma temperaturo estas 33,3 dum la minimuma estas 20,6. Je iu ajn tago de decembro la temperaturo povas etendiĝi de maksimume 12,8 ĝis minimume 8,3. En somero la mara temperaturo ofte atingas 30.

La somervizitanto rimarkas, ke plurfoje semajne la noktan ĉielon sorĉe lumigas spektaklaj piroteĥnikaĵoj, ĉar pluraj vilaĝoj aŭ urboj celebras sian lokan feston. Krome, Malto estas ideala starpunkto al mediteranea krozado kaj centoj da jaĥtistoj regule travintras en Malto. Plej malfrue en oktobro, komenciĝas la klasika ocean-veturado. La mezmara velveturado, inkluzive de la ĉirkaŭsicilia irado komenciĝas de kaj finiĝas en Malto.

Malto estas ne nur suna insulo, sed ankaŭ ravaĵo pro sia abundo de arto kaj arĥitekturo datantaj de la ŝtonepoko ĝis la riĉa baroko 18-jarcenta kaj ĝis la moderna. Futballudo, ĉevalkurado, teatroj markonkursoj : ĉio ĉi tio povas allogi alilandanojn kiel ĝi allogas la loĝantojn.

Bonvenon.

Carmel MALLIA (Malto)

NIAJ LITERATURAJ TREZOROJ

« Estas libroj, kiujn oni lokas sur breto, kaj libroj, kiujn oni legas » diris iu amiko mia. Tial iom tiklis min la titolo, kiun mia kara ĉefredaktoro elektis por tiu rubriko (mi ĉi tie devas humile konfesi, ke mi mem komplete forgesis elekti titolon ! do...). « Trezoro », kio estas trezoro ? Io, kion oni kaŝe enkestigas, io ĵaluze ŝirmita kontraŭ ĉiaj atakoj... aŭ tutsimple « io tre ŝatinda » (PIV 3) (laŭ kiu kriterio ? ne estas precizigite). Kaj jen, ĉar mi skribis fine de mia enkonduka artikolo : « Mi provos konigi, kion mi konas kaj antaŭ ĉio **ŝatigi**, kion mi ŝatas », tial « io tre ŝatinda » (de mi) estas devige trezoro (ankaŭ mi ne donos kriterion) kaj konsekvence mi nur povas laŭdi la elekton de tiu malmodesta titolo !

JEAN FORGE

Antaŭ proksimume dek jaroj, la respondeculo de iu libro-servo (jes ja estis Bernard Schneider de SAT-Amikaro, kial mi tion kaŝos, eĉ se — kaj certe tio estas — li hodiaŭ komplete forgesis tiun konsilon), diris al mi : « Ĵak, vi nepre devus legi 'Mr Tot aĉetas mil okulojn', de Jean Forge ». Ĉar konsilojn mi ĉiam tre serioze priatentas, 7 jarojn poste mi aĉetis... « Abismoj » -n de la sama aŭtoro. Mi, tiam, ne estis superŝutita de laboro — almenaŭ mi certas, ke « kulturaj » artikoloj ne forrabis mian tempon ; — tial mi englutis tiun romanon en malpli da tempo ol kutime necesas por digesti dek paĝojn el verko de Paul Claudel... (aldonu mem ĉi tie vian malpreferatan nunan E-o-verkiston). Ĉu necesas aldoni, ke mi ne atendis sep aliajn jarojn por aĉeti la kvar aliajn librojn de Forge ?...

« La stilo de Jean Forge estas unu el la plej vigle vivaj en la tuta nia literaturo » skribas William Auld, en « Vereco, distro, stilo ». Jen omaĝo, kiu eble helpos al pli vasta diskonigo de la verkaro de Forge. Ĉar estas fakto, ke ankoraŭ nun tiu aŭtoro estas tro ofte konsiderata, kiel « bagatela » verkisto. Bagatela, ĉar li celis nur distri sian legantaron, kaj estas konate, ke « arta » verko nepre devas esti maldistra — se ne enuiga !

La rolantoj de « Abismoj » memverkas sinsekvajn ĉapitrojn, dank'al interveno de hinda fakiro en la unuaj paĝoj de la romano :

« Vi volis vidi ion, kion via plumo povus poste priskribi. Mi plenumos vian deziron... Via okulo penetros en plej profundajn abismojn de homaj animoj. Ĝi rigardos tien, kie regas por homa okulo eterna mallumo ! Vi vidos, kio okazas en tiuj profundoj, kiujn neniu kapablas mezuri ! Kaj via orelo aŭdos la kaŝan pensaron, ŝtelvagos en la abismoj... . Ĉi tiu pensaro laŭtiĝos por via orelo kaj fariĝos parolo ! »

Male al « Mr Tot » aŭ « Saltego trans jarmiloj » — la du aliaj romanoj de Forge — nenio eksterordinara okazas, sed nur « ĉiutage ripetiĝanta historio » disvolviĝas tra ĉapitroj. Feliĉe, revenas la fakiro, lastpaĝe :

« Vekiĝu, amiko ! Sufiĉe vi vagis en la abismoj de homaj animoj. Mirindaĵojn vi vidis. Vi rampis sur abruptaj deklivoj, aŭskultis la muĝon de sovaĝaj montaj torentoj. Vi venis sur la fundon de la abismoj, promenis sur vastaj ebenaj herbejoj. Kaj la suno serene rigardis trans la rokaro, sur floroj vi paŝis, trapaŝis nigrajn densajn arbarojn. Vi konas nun la abismajn regionojn. Strangaj ili estas, multvariaj, ofte freneze sovaĝaj... ».

Senbrida fantazio ŝprucas el la dua romano « Saltego trans jarmiloj ». Originaleco ne fontas el la deirpunkto de la historio, jam facile komprenebla laŭ ties titolo : Dank'al invento de Mateo Fromaĝi, niaj herooj vojaĝos en la pasintecon, ili vivos en la antikva Romo de Nerono. Sed jam antaŭ la « granda salto », la herooj preparas siajn gagojn. Fraŭlino Snob, edukistino, kiu ĉiam ĉion scias « ĉar mi studis ĉe la universitato », ĝojas alveni en Romon de la tempo de Neron, por viziti... Vatikanon ! Tabakaĉ, nenionfaristo, al kiu oni demandas : « Kien vi vojaĝus plej volonte en la pasintecon ? », respondas : « Al Bordeaux (Bordozo)... ĉar mi opinias, ke la vino antaŭ eble cent jaroj estis tie bonega ». Sed la plej akra satiro direktiĝas al la filologoj, kiuj daŭre svarmas en niaj medioj, ĉu ne ? Prof. Sovaĝi asertas, ke oni devas paroli « Kezaro », « kikero » « kinikulo »... kaj ne « Cezaro, Cicero, Cinikulo ». Fine, post alveno en Romo, ni scios, kiu pravas ; kaj jen la dialogo : « Kaj do, kiel vi parolas ? » « Ĉezaro, Ĉiĉero, ĉinikulo... » Daŭrigi mi povos ĝis kompleta ŝtopigo de tiu n-ro ; ne tiom ! Jen do du lastaj « replikoj » : Alvenas la profesoro kaj la kuiristino, kiuj revenas de la legoma foiro : « Kanajla bando ! » diras la profesoro. « Kial ? » « Ili eĉ ne havas terpomojn, tiuj homaĉoj ! » respondas akrasone Sabino... Kaj por plezurigi niajn inistinojn : « La klaĉemo, tiu ĉi frapanta eco de l'virino »... (tamen indulgu Forge, kiu tiuteme verkis malpli da stultaĵoj ol, i.a., J. Proudhon...).

Mi ankoraŭ ne emfazis la fakton, ke Forge estis antaŭ ĉio filmreĝisoro. Ĉiujn siajn romanojn li konstruis, kiel scenaron kaj eble tial mi havas emon parencigi lian stilon al tiu de Lorjak (pseŭdonimo de J.-L. Mahé, aŭtoro de la filmo « Angoroj », spektebla en Grésillon) : vigla stilo skribis Auld, ja vigla kiel estis la stilo de Fritz Lang ; F. Lang. kiu ne maltrafis, kiam li surekranigis la ĉefverkon de Forge « Mr Tot aĉetas mil okulojn ». (Die 1 000 Augen des Dr. Mabuse »). Bedaŭrinde komence de la filmo aperas nur la indiko « laŭ ideo de Jan Fethke » (reala nomo de Forge), kaj ne kiel laŭ la kontrakto devus esti « laŭ Eo-libro 'Mr Tot'... ». Ĉar Mr Tot estas detektiv-romano, mi ne volus tro malvualigi la intrigon. Sufiĉas scii, ke Tot estas riĉulo, kiu aĉetas hotelegon laŭ la propono de dubinda sciencisto. Tie, li instalas siajn « mil okulojn » (speco de televido), dank'al kiuj li povos spioni en ĉiuj ĉambroj. Ekde tiam, ĉion oni povas imagi kaj Forge ne flankenlasis tiujn eblecojn. Ne malestas erotikaĵo, kvankam hodiaŭ ĝi povus ŝajni iom « pala »... : « Ŝi estas nuda. Sed de ŝia blindige blanka korpo eliras mirinda brilo, kiu envolvas ŝin kiel vualo. Ŝi staras antaŭ la spegulo, kunmetinte ambaŭ manojn post la nuko. Ŝi fleksas sin malantaŭen kiel en sopira deziro. Ĉiuj logiloj de ŝia korpo elmontriĝas plene. Ŝiaj lipoj estas duone malfermitaj. Ili ŝajnas trinki kisojn en la malpleno... ».

Sed ne timu, pruduloj, la romano estas 240 paĝa kaj vi havos tempon malruĝiĝi.

La du lastaj libroj de Forge estas « verdaj » novelaroj. La naŭ novelojn de « La verda raketo » mi konsilas al vi legi post lacega labortago. Ili malstreĉigos kaj, certe, rid(et) igos vin. Certe plej leginda estas la novelo « Ses leteroj », kiu ankaŭ troviĝas en « 33 rakontoj » (Stafeto, 1964).

« Mia verda breviero » estas daŭrigo de « La verda raketo ». Plie, Forge priskribas kiel li konatiĝis kun E-o kaj E-io — iom naive, sendube ; sed tiu sama naiveco aperas en « Unuaj paŝoj en Filmujon » kaj fine eble dank'al tiu ĉi lasta libro, oni pli intime konatiĝas ne kun la verkisto, sed kun la homo ; tamen interese, ĉu ne ?

Jak LE PUIL

LA AVENTUROJ DE FIFI STULTUL



PAĜO DE LA GEKNABOJ

PROMENADO EN LA ARBARO

(Verkis kaj rolis gejunuletoj el Hennebont dum la printempa semajno 1984 en Grésillon. Ili faris siajn pupetojn.

UNUA SCENO

Panjo : Miaj karaj infanoj, preparu vin por la promenado.
Paĉjo : Fredo, ĉu vi trovis viajn botojn ? Ĉar en la arbaro la padoj estas malsekaj kaj kotaj.
Fredo : Jes, paĉjo ! mi havas miajn botojn, ankaŭ la dorsosakon por la pikniko. Mi eĉ prenis mian poŝtranĉilon. Se mi renkontos lupon, mi mortigos ĝin.
Panjo : Solena, rapide kombu vin. Fredo estas preta kaj atendas vin.
Solena : Jen mi, panjo ! Mi estas tute preta. Ĉu vi preparis la sakon ?
Panjo : Jes. Mi enmetis panon, ŝinkon, kukon, fruktojn, akvon kaj fruktosukon.
Fredo kaj Solena : Dankon. Bone, panjo. Vi estas tre afabla. (Ili kisas ŝin).
Paĉjo : Vi devos reveni je la kvina. Ne perdiĝu ! Bone rigardu la indikilojn.
Fredo kaj Solena : Jes paĉjo, ni tre atentos.
Ĝis revido. (Ili kisas lin).

DUA SCENO


Fredo : Estas agrable ĉi tie. Rigardu la arbojn ! Ili estas altaj kaj dikaj.
Solena : Fredo, mi trovis belan fungon, sed mi ne scias. ĉu ĝi estas manĝebla.
Fredo : Jes, ĝi estas bela, sed mi kredas, ke estas prefere lasi ĝin. Atentu ! eble ĝi estas venena.
Solena : Do, mi forĵetas ĝin.
Fredo : Jen du vojetoj. Kien iri ? Ĉu dekstren aŭ maldekstren ?
Solena : Ni rigardu la indikilojn.
Fredo : Kie ili estas ? Mi ne vidas ilin.
Solena : Strange ! Ankaŭ mi ne vidas ilin. Kion fari ?
Fredo : Estas pli saĝe reiri hejmen.
Solena : Ne, ni ne reiru. Ni iru dekstren.
Fredo : Kaj se ni perdiĝos ?
Solena : Ne ploru frateto ! Ni ne perdiĝos.
Fredo : Mi timas ; mi tute ne konas tiun vojon.
Solena : Ne timu ; baldaŭ ni certe trovos la grandan vojon al Baugé.
Fredo : Mi ne plu scias, kie ni estas.
Solena : Ankaŭ mi ne scias ; tamen ni daŭrigu.
Fredo : Mi komencas esti laca. De longe ni marŝas.
Solena : Oh ! mi vidas bovinon. Rigardu, inter la arboj.
Fredo : Se estas bovino, eble estas farmbieno.
Solena : Kaj eble ankaŭ mordema hundo.
Fredo : Mi ne timas la hundojn ; mi havas poŝtranĉilon.
Solena : Mi vidas viron. Ĉu estas la farmisto ? Ni iru al li.
Fredo : Jes, vi pravas ; ni iru !
(Ili vokas kune : Sinjoro ! Sinjoro !)

TRIA SCENO

Solena : Saluton, sinjoro !
La farmisto : Saluton ! Kion vi faras tie ĉi ?
Fredo : Ni promenis en la arbaro, sed ni ne plu scias, kie ni estas.
La farmisto : Ĉu vi eraris ?
Solena : Jes, sinjoro. Ni ne vidis indikilon.
La farmisto : Kie vi loĝas ?
Fredo : Ni loĝas en la kastelo Grésillon.
La farmisto : Grésillon ? Tio devas esti for de ĉi tie, mi ne konas tiun nomon.
(al la aŭskultantoj) : Kaj vi, ĉu vi scias, kie estas Grésillon ?
Solena : Mi konas la telefonnumeron. Ĉu vi havas telefonon ? Ĉu mi povas telefoni ?
La farmisto : Kompreneble ni havas telefonon ; ni ne estas prahomoj. Kio estas via numero ?
Solena : 89 10 34.
La farmisto : Bone. Mi tuj vokos viajn gepatrojn.
Eniru en mian domon.

Kaj tiel Fredo kaj Solena telefonis al siaj gepatroj, kiuj venis ĝis la farmo. Ĉiuj estis feliĉaj.
La gepatroj invitis la farmiston veni al la kastelo.

Verkis kaj Rolis,
Solen, Frédéric, Guillaume, David, Claude



Tut-anĥ-Amun

La egipta trezoro el eburo kaj oro

Dum la « Kultura Periodo » en julio 1984 en kastelo Grésillon, s-ro Hugo Röllinger, FRG., prelegis i.a. pere de 125 kolor-diapozitivoj pri jena temo, utiligante restadon en Egiptio kaj ĉerpinte konojn el tri grandaj egiptaj ekspozicioj en Berlino, Munkeno kaj Hildesheim, kaj el la internacia literaturo.

Sinjoro Röllinger disponigis al ni reviziitan eltiraĵon el siaj prelegoj. Kompreneble tia posta sobra represo nur tre supraĵe povas peri impreson pri la ora brilo kaj la arteca lerteco de la tombaj trezoroj, prezentitaj dum la prelego.

Estas telegramo, per kiu mi komencu. Telegramo de l' 6 nov. 1922. Ĝi tekstis : « Fine mi faris mirindan malkovron en la « Valo de l'Reĝoj » : grandiozan tombon kun nedifektitaj sigeloj. Mi rekovris ĉion ĝis via alveno. Mi gratulas ! » Fino de l'citaĵo. Ĉi-tiu telegramo intertempe apartenas al la historio de la arkeologio. Sendis ĝin Howard Carter al Lordo Carnarvon en Anglujo. Carter estis atinginta sian celon : li estis malkovrinta tombon de faraono. Li estis arkeologo kaj dungita fare de la riĉa Lordo Carnarvon. Sendante la telegramon, li ankoraŭ ne sciis, ke la tombo efektive enhavis la serĉatan mumion de Tut-anĥ-Amun kaj neimageble riĉajn abundajn trezorojn. Post alveno de Lordo Carnarvon oni bezonis 3 monatojn por ordigi kaj registri multnombrajn objektojn trovitajn en 2 antaŭkameroj ; estis strangaj bestoj, statuoj kaj ĉiebriletanta oro. Tiam, fine, ili staris antaŭ la lasta pordo. Kiam Carter rigardis tra truo, li opiniis rigardi oran cizelitan muron. Estis la flanka vando de la ligna ĉerkujo, kiu preskaŭ tute plenigis la spacon de la kamero. Kvar ĉerkujoj estis kombinitaj unu en la alian. Ili enhavis la ŝtonan sarkofagon.

Interne kaj ekstere, tiuj « ĉerkaj ŝrankoj » estas abunde ornamitaj per hieroglifoj kaj mitologiaj scenoj. Ĉar la ĉerkaj ŝrankoj havis, laŭ egipta kredo, gravan religian signifon por la vojo de l'faraono al la senmorteco.

Sur la ekstera flanko de la dekstra pordo de l'ĉerkujo estas videblaj du protektaj dioj. Interne de la maldekstra pordo la diino Neftis etendas gardante siajn flugilojn. La diinoj Isis kaj Neftis, interne de la maldekstra pordo, staras sur hieroglifo, kiu signifas oro, kaj movas la flugilojn por doni vivoforton al la mortinto. Ekstera flanko montras sep el la entute naŭ kurbaj bastonoj por la faraonoj. Ili estas simboloj de l'reĝeco. Sur tri el ili staras la krono de Supra Egiptio, sur aliaj tri tiu de Malsupra Egiptio kaj sur la sepa la sankta serpento Ureuso. Malsupre estas vico da diaj Osiris-figuroj kun la du diversaj kronoj.


Ĉiuj portas la barbon de l'senmorteco. Tiuj scenoj rilatas al ĉerkujo n-ro III. Ĝi estas enŝovita en ĉerkujon n-ro II. Ties mezuroj : 3,85 m longa, 2,50 m larĝa, 2 m alta. Sur unu el la du pordoj staras la faraono antaŭ Osiris. Li portas la duoblan kronon pri Supra kaj Malsupra Egiptioj. Osiris, flanke, estas simile prezentita. Inter ambaŭ staras vazo kun lotus-floro. Malantaŭ la faraono parolas diino Isis : « Vi estas mia filo, el mia korpo, mia amato, estro super ambaŭ landoj, la pravigito en la transa mondo ».

Sur la dekstra pordo la faraono staras vidalvide de l'dio Re-Harahte. La reĝo portas kronon kun plumoj de struto, super kiu ŝvebas la disko de l'suno. Malantaŭ la reĝo staras Maat, la « Diino de l'vero ». La falkokapa dio tenas la sceptron kaj la konatan simbolon por « vivo », nomata anĥ, kiun ni renkontas multfoje en la egipta mitologio. Super la suna disko de l'dio la hieroglifoj diras : « Bonvenon, vi venas en paco, mia amata filo... Mi kondukos vin en la nekropolon al loko, inda al unu el la dioj, la regantoj de l'transa mondo ! » La ekstera flanko de ĉerkujo II prezentas impresoplene Tut-anĥ-Amun, jen kiel figuron de l'dio Osiris enbalzamigita. La disko sur lia talio estas simbolo de l'nokta suno, kiun diaj figuroj tiras per ŝnurego en la tagon. La diino Neftis, fratino de Osiris, staras sur la signo por « oro » kaj ventumas per siaj larĝetendaj flugiloj vivigan spiriton al la animo de l'mortinto. La ĵus priparolita ĉerkujo n-ro II estis enŝovita en ĉerkujon n-ro I. Do ĝi estas eĉ pli granda kaj luksa. La mezuroj : iom pli ol 5 m longa, 3,55 m larĝa kaj 2,70 m alta.

La mumio de l'faraono mem estis metita en ĉerkon, kiu estis laŭforme adaptita precize en alian ĉerkon kaj tiu plie en trian. Do, estas tri ornamitaj ĉerkoj unu en la alia. La meza ĉerko, longa 2,03 m, imitas homan figuron. Mirinde es-

tas, ke la tuta ĉerko estas riĉe ornamita per plumaj ornamaĵoj, precize inkrustitaj per koloraj vitraĵoj kaj semi-juveloj. Estas nekredeble, ke la metia lerteco antaŭ 3360 jaroj en Egiptio estis tiel perfekte evoluinta. La plej interna ĉerko, el martelita oro 22-karata, pezas 1110 kg. Tiu ĉerko, alta preskaŭ 2 m, ĉirkaŭis la reĝan mumion, ornamitan per juveloj kaj ora masko. Ankaŭ sur tiu mumiforma ĉerko la trajtoj de l'reĝo estas perfekte plastike modlitaj. Kontraste al la grandioza brilo de pura oro, dukolore inkrustitaj vulturoj ĉirkaŭvolvas, kvazaŭ gardante, la faraonon per siaj flugiloj. Sur tiu ĉi plej interna ĉerko el masiva oro Tut-anĥ-Amun estas figurita jam kiel dio Osiris. La pura oro donas al la reĝa vizaĝo apartan klarecon kaj delikatecon. Nekomparebla artaĵo estas la masko el pura oro, kiu estas metita super la kapo kaj la ŝultroj de la reĝa mumio. La masko estas zorgeme polurita kaj entenas delikate faritajn inkrustaĵojn el semi-juveloj, karneolo, blua vitro, fajencaj perloj kaj kvarco. Ĝi pezas 11 kg.

La kvazaŭa ora portreto donas al ni realisman imagon pri tio, kiel aspektis la juna reĝo



Egipta diino Selket.

de l'tempo de sia frua morto. Laŭ egipta kredo ĉiuj klopodoj por renaskiĝo estis vanaj, se oni ne konservis la korpon de l'mortinto. Pro tio, krom la ĉerko, havis plej gravan signifon ankaŭ la t.n. kanopa kesto, destinita por konservi la viscerojn de la balzamigita mortinto. Pompa t.n. kanopa ŝranko, 2 m alta, apartenis al la meblaro trovita en la trezorejo de l'tombo. Sed la plej gracia videbliĝas antaŭ la ŝranko : antaŭ la mezo de ĉiu flanko staras unu orumita statuo, do entute kvar protektaj diinoj, 90 cm altaj. La plej ĉarma, ja eĉ eleganta el ili estas tiu de la diino Selket.

Gardeme, ŝi etendas siajn brakojn kaj eĉ ankaŭ la fingropintojn. Vestita estas la diino per riĉe plisita robo el ekstreme delikata teksaĵo, kvazaŭ diafana, markanta la gracilajn formojn de l'korpo. Sur la kapo Selket portas sian simbolon : skorpion kun minacanta, venena pikilo, simbolo pri magio kaj kuracado.

Entute 413 ĉarmaj figuretoj akompanis la faraonon en la regnon de l'transejo. Ili estas t.n. Uŝebti-figuroj, proksimume 70 cm altaj. Ili estas ne nur simboloj, ili estas kultaj objektoj, kvazaŭ magiaj servistoj por la mortinto en la transejo. Tie ili faru ĉiujn laborojn kaj servojn, kiujn komisios al ili la dioj. Kiel anstataŭantoj de l'reĝo ili ankaŭ portas ties faraonajn insignojn. Ankaŭ orumita statueto de dio Atum akompanu la faraonon en la transejon por lin asisti kaj subteni. Eĉ pri la plej kutima egipta trafikilo, pri ŝipoj, la mortinta reĝo povis disponi. Pro tio modelŝipoj apartenis al la ekipaĵo por servi al la reĝo veturi en la transejon. Unu el ili, senvela ŝipo, 1,20 m longa, brilas en radiantaj koloroj. Alia el multaj skulptaĵoj estas : la reĝo sur la leopardo. Ĝi estas majstra verko de l'plastiko, montranta la faraonon en unu el la diversaj stadioj de lia transformiĝo. Li staras sur nigra leopardo, la besto de l'nokto. Alia artaĵo estas ora ventumilo por festoj. Supre duonronde estis en truoj fiksitaj strutaj plumoj. Tiu majstra reliefaĵo, montrante ĉasadon al strutoj, estis la supro de ĉ. 1 m longa bastono. En rapidega veturado la reĝo celas al strutoj. Eĉ ĉashundo partoprenas. Aparte interesa estas *personigita* hieroglifo « *anĥ* », signifanta « *vivo* ». La signo portas tian kompletan ventumilon. La senco estas do : vivo kaj protekto por la reĝo. Belega ebura kesto el la tombo faraona estas unu el la plej imponaj verkoj. Ĝi estas alloga kombinaĵo kun baldakensimila kovrilo kaj unikaj dekoroj : koloraj reliefaj scenoj el ebono, el fajencoj kaj el vitraĵoj.

La temo sur la kovrilo estas la reĝa paro en abunda ĝardeno. « Tut » etendas la manon al bukedo el lotus-floroj, kiun la edzino, en robo

nekaŝema, prezentas al li. Alia sceno prezentas Tut-anĥ-Amun dum ĉasado al birdoj kaj fiŝoj. Ree asistas Anĥesenamun tutproksime ĉe li. Imponas unika figura grupo el orumita ebona ligno : la diino Menĥeret portas la mortintan faraonon sur sia kapo en la regnon de l'Hadeso, por ke li povu atingi la « Dion de l'suno ».

Inter la 32 statuetoj, kiujn Howard Carter trovis en la trezorejo de l'tombo, sep reprezentas Tut-anĥ-Amun. Aparte bela figuro montras la faraonon kun la tipe ĉiam antaŭmetita *maldekstra* kruro. Ekstreme luksa ekzemplero de sceptro montras gracilan papirusan planton. Sur la tigo sidas larĝa floro el kiu kreskas la volbita folio de l'sceptro. Certe la faraono portis ĝin dum oferaj ritoj favore al la dioj aŭ al mortintoj, ĉar la ora reliefaĵo montras kvin bovojn, katenitajn laŭ la templaj ritoj. Ankaŭ multaj objektoj kaj mebloj el la reĝa palaco troviĝis en la ejoj de l'tombo, ekzemple aparte luksa trona seĝego, tute kovrita per oro kaj abunde riĉe inkrustita per semi-juveloj, fajencoj, vitraĵoj kaj arĝento. La arteca pompo de la sceno en luksa halo de l'palaco, bildigita sur la dorsa apogilo, estas apenaŭ priskribebla. La suno sendas siajn vivigajn radiojn per homaj manoj al ĉarma sceno, en kiu Anĥesenamun dorlotas sian edzon per bonodora aromaĵo. La roboj estas el arĝento, la korpoj el vitraĵoj. Abunda kaj varia estas la aro da trovitaj ornamaĵoj kaj ceremoniaj objektoj. Temas ekzemple pri skaraba braceleto, majstra verko el oro, karneolo, turkiso, kvarco kaj lazurito.

Kiu moderna oraĵisto kapablus produkti ĝin pli perfekte ol la kolego antaŭ 3300 jaroj ? Estas ja konate ke ĉi tiu specio de skarabo, la nekroforo, laŭ egipta kredo, estis sankta simbolo pri la kulto al la suno. Aŭ temas laste pri la vere grandioza reĝa diademo el la tombo mem, trovita ĉe la mumio : diademo kun la egiptaj prasimboloj, la vulturo pri Suda kaj la ureusa serpento pri Norda Egiptio. Speciale menciindas ĉirilate la luksaj inkrustaĵoj per karneolo, kalcedono, obsidiano kaj glazur-aĵoj. Laŭlonge de l'tuta bendo, vico da karneolaj vazetoj kompletigas la majestan impreson.

Kion mi diru resume pri Tut-anĥ-Amun, pri tiu faraono, kiu mortis, antaŭ ol li apenaŭ povis regi, sed kies morto pliriĉigis la mondon multe pli ol la trezoroj en lia tombo ? Ĉar tiu ĉi tomba trovaĵo reprezentas detalan informadon kaj instruon pri ĉiuj egiptaj transejaj ideoj kaj religiaj konceptoj kaj eĉ pri la ĉiutaga vivo de faraono.



Tut-anĥ-Amun kaj edzino Anĥesenamun.

Kompreneble el la entute 2250 tombaj aldonaĵoj povis esti prezentita nur eta elekto. Tamen mi esperas, tute ne estante egiptologo, ke mi sukcesis peri al vi almenaŭ *supraĵan* impreson pri tiu, laŭ mi, treege interesa medio. Sed antaŭ ol mi finu, jenan rimarkon. Estas ĝojige kaj konsole, ke tiu lasta, kiel la nura netuŝita faraono, ripozas ankoraŭ nuntempe en la « Valo de l'Reĝoj », transe de Nilo, oriente de la piramidoj, 750 km sude de ili. Preter la historiaj temploj sur la « Insulo Filao » (Philae) kaj preter la « Kolosoj de Memnon », mense mi veturas. Ili, la « Kolosoj », gardas depost pli ol 4000 jaroj la alveturon al la nekropoloj de la faraonoj kaj reĝoj.

Tiam, fine, ni staras, profunde malsupre en la natura kripto, vidalvide al la « Reĝo Tut », kiu ripozas dum 3347 jaroj en sia plej ekstera, ora ĉerko, gardita fare de kvar diinoj. Ili, epitafe, al la adorata reĝo parolas : « Mia filo, Osiris, reĝa moŝto super ambaŭ egiptaj landoj, vi estas forta, vi estas triumfanta, vi vivos eterne ! »

Hugo Röllinger
D 873 Bad Kissingen

FANTAZIAĴO PRI GASTRONOMIO

DE HELIKOJ ... AL GEEDZIĜA FESTO

La baza nutraĵo de la Francoj, ĉiu homo tra la mondo tion scias, konsistas el ranoj kaj helikoj. Ĉu troigo ? Iomete mi opinias.

Jes, la Francoj estas tiel kuraĝaj, ke ili ne timas alfronti la dudek kvin mil dentojn, propraĵon de unu el la sennombraj helikoj ĉasitaj ĉiujare ; jes la helikoj longe, bone preparitaj, estas delikata manĝaĵo. Sed, kredu min, la Francoj pli ofte manĝas biftekon kun frititaj terpomoj ol helikojn ! Tamen mi, franca dommastrino, persone spertis misaventurojn pri erara prijuĝo de tiu pasio ĉe mia propra edzo.

Iam, dum libertempo, li kaŝe kolektadis en la ĝardeno, imponan kvanton da tiuj konkonbestoj kaj plenŝtopis grandegan argilan poton. La 13-an de julio, antaŭtago de la franca nacia festo, li triumfe malkaŝis sian trezoron kaj sugestis, ke tia delikataĵo plibonigu la morgaŭan tagmanĝon.

(Malfermante parentezon mi devas diri, ke en Francio kiel verŝajne en aliaj lokoj, la idealoj ĉe edzo kaj edzino ofte diferencas : senlabora viro volonte profitas feriojn por organizi, laŭ sia propra temperamento, idealan hejman vivon. Povas temi pri la tiel nomataj « hejmlaboretoj » t.e. miloj da okupoj diversaj : domaj, garaĝaj aŭ ĝardenaj. Aliaj uloj preferas legi, fumi, kartludi. Tamen preskaŭ ĉiuj asocias al festotago ideon pri bona manĝado. Kontraŭe, la dommastrino, kiu malofte ĝuas la kuneston de la amato preferas simpligi la diversajn tedajn preparojn kaj profiti agrablan kunestan ripozon post rapida kvankam agrabla familia manĝado).

Ankoraŭ nun mi memoras la tiamajn antagonismajn argumentojn por aŭ kontraŭ la preparado de gluecaj bestetoj por soleni la datrevenon de la venkopreno de la Bastilo. Finfine, kompreneble, ni manĝis helikojn tiun 14-an de julio !

Kelkajn jarojn poste mi, kun mia edzo translokiĝis al milit-kampadejo en la provinco « Champagne » produktodona je ŝaŭma vino kaj helikoj. Dank'al lerta servistino, escepte kapabla pri la purigado kaj preparado de la valoraj dukornuloj, mi rapide akiris en la ĉirkaŭaĵo reputacion de kuirartistino. Ĉu vi deziras provi mian recepton ?

Laŭ la regiono, oni elektos egajn bestojn kun flav-blankaj konkoj, aŭ etajn grizajn helikojn ofte preferatajn de la ŝatantoj. Ne necesas « trakuri la kamparon » por ĉasi tiujn bestojn. Sufiĉas promenadi en familia ĝardeno, frumatene aŭ prefere post fulmotondro, tenante profundan ujon kaj direktante la okulojn al la grundo, al murtruoj aŭ randoj de aleoj sub verdaj bordaĵoj. Tagon post tago vi tiamaniere kolektos la kontentigan kvanton. Ne forgesu meti kovrilon sur la ujo kaj enlasu iom da aero. Nun, estiĝas debato : ĉu oni devas nutri aŭ fastigi la viktimojn ? Fakte pli bone estas nutri ilin. Tio almenaŭ estas la opinio de mia patrino. Tamen, unue ili devas tute elĵeti la eble venenajn antaŭajn nutraĵojn. Poste ĉiutage, donu al la karaj bestetoj foliojn de salato, prefere laktuko, kaj diserigitan panon trempitan en lakto. Tiamaniere vi ricevos altkvalitajn helikojn dikajn kaj molajn.

Ĝis tiu stadio la laboro estas pli malpli plaĉa. Poste, mi kore konsilas al vi trovi volontulon por la lavado. Laŭ mi estas la plej malagrabla parto de la afero. Oni devas lavi, kaj relavi la helikojn ĝis la glueca ŝaŭmo tute malaperis. Fine oni ĵetas la tutan ĉasaĵon en bolantan akvon aromigitan per riĉaj parfumoj : blanka vino, salo, pipro, petroselo, timiano, ajlo, cepoj, spiclaŭro kaj entenantan, zorgeme enfermitan en tuketo, iom da ligna cindro. Post sufiĉa kuirado ; oni eltiras la bestetojn el la konkoj kaj senigas ilin je la nigra hepato. Denove oni lavas la konkojn kaj aranĝas ilin sur pura tuko, tiamaniere, ke la interna akvo eliru sur la tuko.

Tiam oni preparas sorĉan miksaĵon faritan el freŝa butero, delikate hakita petroselo, pistita ajlo, salo kaj pipro. En ĉiun konkon oni enmetas iom da odoranta butero, helikviandon plenŝtopas per plia miksaĵo kaj metas sur plado.

La morgaŭan tagon, prefere por la tagmanĝo, sufiĉas varmigi la pladon en mariabano, elekti botelon da bona vino, disponi pri specialaj forketoj kun du longaj dentoj. Finfine parfumas la manĝoĉambron edena alhazado, kiu salivigas edzon kaj gastojn.


Mem ĝuu, se plaĉas al vi, kaj informu nin.

Paule Potin

POR VIA DISTRO

ENIGMO

Grava verko reeldonita en 1980. En kvadratoj 1-23 estas la titolo de la verko, en 24-38 la tiama eldoninto.



La respondojn skribu en tiujn kvadratojn, en kiuj troviĝas la samaj numeroj kiel post la demando.

1. Reproduktaĵo /sama kiel la originala/ 5, 7, 8, 25, 23.
2. Riverego en Afriko 36, 11, 24, 12.
3. Perdo de la vivo 34, 35, 28, 22, 38.
4. Nevola seniĝo de posedaĵo 17, 27, 32, 10, 7.
5. Mal-jes 2, 15.
6. Balta lingvo 6, 20, 26, 31, 33.
7. Tre malgranda 14, 30, 29.
8. Prepozicio 16, 1, 21.
9. Oni devas jene konduti 13, 9, 3, 18.
10. Montro de subita gajeco 19, 4, 37, 12.

I. Nagy.

SOLVO DE LA ENIGMO

perpleksiĝa	E	batsilo	meblo laŭ kontrakto	T	boato kun trenroto	muzikinstrument	estinto	A	prizorgi la aferojn de ru	O	giganto
kia la diavolviĝo de Espo...	M	A	L	R	A	P	i	D	E	G	A
miksaĵ de sonoj	B	R	U	J	adverbo	I	A	M	plezuro, malaflikti ĝo	R	hipodermo
fariĝos iun kunmiksaĵo	A	M	A	L	G	A	M	i	G	O	S
sur indonezia veturilo	R	i	nomo de la sepa	Ŝ	malgrandegulo	N	A	N	O	persona pronomo	U
M	A	L	F	i	D	korpulenta	mizera biblia heroo	i	j	O	B
malkonfid'	S	por koni La opinion de la publiko (af)	O	P	i	N	i	S	O	N	D
interjekcio	A	j	pli ol pep tiun sekvantan	O	K	arbvojo	numeralo	T	adverbo	i	E
konsenci	senvaloraĵoj	E	fidelul'	bordeaĵo	K	A	D	R	O	oni ne estas certa pri ĝi	R
S	A	N	K	T	O	L	E	ink	ank	D	M
konjunkcio	Ĉ	A	R	grimasetikil'	R	E	K	kontrakto	L	U	O
groupe	A	N	E	filino de kadmo	P	O	prepos kun dividsenco	M	karesforme ; Manjo	B	pingarbo
faritan en iu kavriga planto	Ĵ	superega ankaŭ ne	D	i	A	respektoplena al Dio	M	A	G	i	A
K	A	N	A	N	La 25ª elemento	P	sorĉa, rava	R	mil por atentigi	N	B
akiri famon	R	E	N	O	M	i	G	i	kemia prefikso	D	i
kvalifikas kas nombron konatan de moloriskoj	O	K	T	A	N	A	turka oficiro	A	G	A	O

GRAMATIKO PER BONHUMORO

TEMPO-DAŬRO — DATO

DUM -EN estas prepozicioj, kiuj esprimas :

— **la daŭron de ago**

— dum la promenado ili sekrete parolis

— en tri tagoj, ili farbis la ĉambron

— **la daton**

— li naskiĝis en la 3-a de majo.

N povas anstataŭigi tiujn prepoziciojn :

— la konstruo de tiu ponto daŭris tri jaroj**n**

— la tuta**n** julio**n** okazis muzikaj renkontoj

— li mortis la 23-an de januaro.


RIM : oni metas :

— aŭ prepozicion

— aŭ **N**

sed NE ambaŭ samtempe.

Ja, kaptilo por la alaŭdoj !



Kiom da ridetoj ! da kisoj ! da flatoj ! antaŭ li konsentos pruntedoni **tiun sensacian al tiuj** stultulinoj Kaj kiom da tempo ĝi vivos ? au tagoj, kaj for la nabo-ĉapoj kaj la reflektoroj ; kaj post kvar tagojn la karoserio estos tute dispecigita ! **Ni restu fidelaj al** la veturiloj de niaj patroj !

Liaj, ŝiaj, iliaj esperoj kaj bedaŭroj.



Ja, plej agrable ni amindumis dum la tutan vesperon ! Sed kiom pli neforgesebla ĝi estus estinta se ĝi ne estis okazinta unu merkredo ! Ve ! Ve !, nur ĉiu vendredo mi ricevas mian vivigan injekton.

Ĉu jes aŭ ne ?



Atentu la naztuketon ! post unu sekundon ĝi falos... ŝi eliros... atendos unu minuto... revenos por ĝin repreni ; eĉ unu rigardon ŝi ne jetos al ni. Tamen, kun tiu Katineto mi volonte interrilatiĝos... unu horo... ne plu... !

KOREKTOJ :

— antaŭ ol, du tagoj**n**, kvar tago**j**.

— dum la tuta vespero, merkredo**n**, ĝiu**n** vendredo**n**.

— un sekundo, minuto**n**, horo**n**.



Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e - D ALICANTE - (1 100 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (12240 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (24 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (55 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 3 de 1984, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Pendant ce mois de juillet qui tire à sa fin, le château s'est gorgé de soleil. Les jours d'orage ou le temps gris ont été rares et les participants aux stages ont travaillé, beaucoup travaillé. Les soirées organisées ont un peu pâti du beau temps. Avouez qu'il est plus agréable de jouer aux boules dans les derniers rayons du soleil que de participer à des activités en salle.

Cependant ce mois de juillet n'a pas été sans histoire. Je ne parle pas des surprises que nous offre la vie en commun. Il s'agit de quelques jours angoissants pour les responsables : en trois jours l'étang s'est presque vidé et transformé en bourbier. Les poissons s'étaient réfugiés dans un trou dont l'eau risquait d'atteindre sous le soleil une température trop élevée. La baignade en cours de nettoyage ne voulait plus évacuer la boue restante qui peu à peu séchait. Le filtre ne recevant plus d'eau mais de la boue s'obstruait peu à peu. La cause apparut lorsque furent découvertes des sources, à l'extérieur de l'étang. Déterminer l'emplacement de la fuite nécessita l'emploi d'une pelle mécanique dont le travail rapide, efficace et destructeur se poursuivit pendant dix heures. L'obturation de la brèche ne fut obtenue qu'avec l'utilisation de 6 mètres cubes de ciment spécial. Ajoutez les heures de main-d'œuvre et la réfection totale du filtre et vous obtenez un montant de 10 000 francs dont nous nous serions bien passés. Et nous ne sommes malheureusement pas à l'abri d'autres surprises de ce genre, les racines des arbres et les animaux semi-aquatiques ayant la fâcheuse habitude de se nicher dans les parois des étangs.

Je vous raconte cette aventure non pour que chacun verse un pleur sur les malheurs de Grésillon ou que votre compassion aille aux responsables. Le compte-rendu de la réunion du Conseil d'Administration de juin vous apporte aussi l'écho de dépenses devenues nécessaires et urgentes. Elles sont très coûteuses. Le remplacement de la tapisserie des escaliers ne pourra pas se faire grâce à la seule bonne volonté. Seules, les manches retroussées ne suffiront pas. Si l'on ajoute à ces dépenses le remboursement d'un nouveau tiers du prêt « service d'eau », il ne sera pas possible, pour le moins, de faire d'autres dépenses. L'entretien devient lourd pour avoir été parfois retardé au profit d'investissements rentables. Il va falloir faire l'indispensable puis consacrer les compléments de recette à l'entretien du parc et des bâtiments. Un programme peut-être peu spectaculaire mais nécessaire.

Aidez-nous. Dès maintenant pensez à vos vacances prochaines. Venez nombreux. Amenez ou envoyez vos amis. N'oubliez pas que DES LE 15 JUIN les activités commenceront au château. A bientôt.

Pierre BABIN.

INTER NI

Dum la tuta monato julio, kiu nun finiĝas, la kastelo baniĝis en varmega suno. La grizaj tagoj ne estis multaj kaj la ĉeestantoj multe laboris. La organizitaj vesperoj iom suferis de la bela vetero. Estas ja pli agrable promeni aŭ sporti en la lastaj radioj de subiranta suno ol partopreni eĉ interesajn sed enĉambrajn aktivaĵojn.

Sed tiu monato julio ne estis senhistoria. La responduloj konis angoron dum kelkaj tagoj : en tri tagoj la lageto preskaŭ malpleniĝis kaj fariĝis ŝlimejo. La fiŝoj rifuĝis en truo, kie akvo riskis atingi ne elteneblan temperaturon en la sunradioj. La naĝejo, kiu estis tiam purigata ne plu volis elĵeti la restantan ŝlimon. La filtrilo de la naĝejo ne plu ricevis akvon sed koton, kiu iom post iom ŝtopis ĝin. La kaŭzo de tio aperis, kiam elŝprucis neatenditaj fontoj ekster la lageto. La serĉado de la likejo postulis la uzadon de maŝino, kies rapida, efika, detrua laboro daŭris dek horojn. La ŝtopado de la breĉo sukcesis nur post enmetado de 6 kubaj metroj da speciala cemento. Aldonu la laborhorojn kaj la koston de la refaro de la filtrilo kaj vi atingos tre altan elspezitan sumon. Ni esperas, ke tiaj surprizoj ne ofte prezentiĝos kvankam ni ne povas esti certaj.

Mi rakontis tiun okazaĵon ne por altiri kompaton. La raporto de la kunsido de la estraro montras, ke ankaŭ urĝaj, necesaj multekostaj laboroj atendas. Ni faros ilin venontjare kaj nepre ne povos fari aliajn des pli, ke ni devas ankaŭ repagi la duan trionon de la sumoj pruntitaj por la instalado de la akvo.

Amikoj, helpu nin. Venu multnombraj ankaŭ venontjare. Sendu al ni samkursanojn, korespondantojn. Ne forgesu, ke ek de la 15-a de junio la kastelo estos malfermita. Informiĝu jam en oktobro pri la programo de 1985. Ĝis !

RÉUNION DU CONSEIL D'ADMINISTRATION DU 24 JUIN 1984

A cette réunion qui commence à 10 heures sont présents : Mmes Cheverry, Vincent, MM. P. Babin, F. Boyet, H. Boyet, G. Dairon. Excusés : Mmes Micard et Prévot ; MM. D. Babin, Bénistant, Bodereau, Chevalier, Métivier.

Le président rappelle que se déroule actuellement un stage informel de personnes du troisième âge qui réunit 17 participants de quatre pays venus là pour se rencontrer, se détendre et visiter la région.

Les stages d'été se présentent assez bien puisque, à ce jour, il y a 86 inscrits pour le premier, 52 pour le deuxième, 42 pour le troisième, 24 pour le quatrième. Pour le troisième stage, pour la première fois, quelques personnes viendront spécialement pour les travaux manuels ce qui est encourageant. Pour le week-end de fin septembre doit avoir lieu une rencontre de 60 personnes retraitées des P.T.T. Pas de modification dans le programme, les activités prévues devant avoir lieu. En ce qui concerne le quatrième stage le programme est mis au point par les organisateurs eux-mêmes.

Le président rappelle qu'il avait demandé aux membres que les éventuelles propositions de modification des programmes lui soient faites dans le courant de l'hiver. Rien ne lui est parvenu.

Il semble que la publicité soit faite trop tard dans les revues. D'autre part les stagiaires se déterminent souvent plus en fonction du calendrier des stages qu'en fonction de leur contenu.

Pour 1986, il est proposé une semaine de haut niveau pendant le Congrès de Pékin, éventuellement sous les auspices d'une organisation espérantiste.

Pour 1985, la proposition est faite de découper le programme d'été de la manière suivante : stage de détente du 15 au 30 juin ; conférences et cours du 30 juin au 14 juillet ; cours du 15 juillet au 4 août ; travaux manuels du 5 au 19 août ; dernier stage du 19 au 30 août. Ce décou-

Merci à tous les amis qui ont répondu à notre appel concernant les sociétaires dont nous sommes sans nouvelles. Grâce à eux nous avons eu un certain nombre d'informations très utiles. Mais cet appel reste valable encore pour un certain nombre. Merci d'avance.

page sera présenté au Conseil d'Administration en octobre. La rencontre d'enfants de la première semaine d'avril aura lieu même si ce doit être sous une forme légèrement différente.

La participation relativement restreinte au troisième stage (travaux manuels et esperanto) pose un problème sur lequel se penche une fois encore le Conseil. Comment attirer un plus grand public est la question à laquelle il est bien difficile d'apporter une réponse globale et définitive. Multiplier les activités signifie engager des frais supplémentaires difficilement envisageables actuellement. Il faudra adapter le type d'activités en fonction des demandes pendant les stages à venir.

Un stage d'informatique en esperanto est prévu pour 1985 ou 1986 mais il est impossible actuellement d'en préciser la date.

Afin de pouvoir accueillir des stages de jeunes au printemps et peut-être des classes vertes en avril-mai (60 élèves par semaine pendant quatre semaines), il nous faut nous plier aux normes de sécurité. Les tentures des escaliers devront être enlevées. Seront-elles réutilisables ? Il faudra les remplacer par du papier.

Le système d'écoulement des eaux usées est à refaire ; le devis est lourd car il faudra non seulement refaire les canalisations mais encore installer une cuve de décantation de grande capacité.

Il sera peut-être possible de faire goudronner le chemin d'entrée jusqu'au premier pont, ce qui correspond à la partie de la propriété dépendant de la commune de Saint-Martin-d'Arcé, grâce à un prêt à un taux bas.

Le cultivateur qui depuis de longues années récoltait les foins a, sans prévenir, arrêté son travail. Il nous a fallu faire face à la situation avec les moyens du bord.

Le renforcement de la ligne électrique qui alimente le château permettra d'obtenir une plus grande puissance au compteur et d'avoir un meilleur rendement du matériel électrique.

La séance est levée à 16 heures.

Le secrétaire : Guy DAIRON.

ESPERANTO KULTURDOMO GRESILLON LIBROSERVO

Commandes à : S-ino J. VINCENT B.P. 54, 49150 BAUGE (franco au-dessus de 200 F).
Libellé des chèques : Maison Culturelle Espérantiste.

I. **LERNOLIBROJ**

	PREZOJ
Abrégé pratique de grammaire (ICEM)	8,00 F.
Amuzaj dialogoj (Lienhardt)	38,00 F.
Cours sur disques « Tra la mondo » (Ribot)	
avec 7 livrets	130,00 F.
(même prix avec cassette)	
les 7 livrets seuls	65,00 F.
Ĉu vi parolas tendare ?	15,00 F.
Esperanto legolibro	30,00 F.
Gramatika gvidlibro (G.E.E.)	15,00 F.
Gvidlibro por la ekzamenoj de F.E.I.	5,00 F.
Gvidlibro por superaj ekzamenoj (Pechan)	40,00 F.
Initiation théorique (Denoël)	35,00 F.
Junulkurso (S.A.T.)	30,00 F.
supplément	6,00 F.
5 disques	35,00 F.
Kiel diri (Lentaigne) (5000 expressions)	20,00 F.
Ludoviko en Nederlando (Delaire)	60,00 F
Manuel de perfectionnement (J. Couteaux)	7,00 F.
Manuel d'étude (J. Couteaux)	7,00 F.
Manuel d'initiation (B. Thaillet)	6,00 F.
Metodo 11	33,00 F.
Metodo 12	35,00 F.
Nos premiers pas en Esperanto	4,00 F.
Nouveau cours rationnel (S.A.T.)	45,00 F.
Parler l'Esperanto (Volpelière)	20,00 F.
Paŝoj al plena posedo (Auld) progresiga libro	53,00 F.
Plena analiza gramatiko (Waringhien)	135,00 F.
Por la praktikantoj (Babin) por progresantoj	25,00 F.
Précis grammatical (Ribot)	4,00 F.
Premier manuel	4,00 F.
Privilegia vojo (Setälä) rektmetoda kurso	26,00 F.
Proverbaro franca-esperanta (Bourgois)	10,00 F.
Saluton (Childs-Mee)	65,00 F.
Sub la verda standardo (Korte) por infanoj —	
Laborilo 1	30,00 F.
Laborilo 2	25,00 F.
Gvidilo por la instruanto	25,00 F.
Tiel diru ! (Lentaigne)	20,00 F.
Gerda malaperis (Piron)	12,00 F.

II. **VORTAROJ**

Dictionnaire de poche (S.A.T.)	15,00 F.
Dictionnaire Français-Esperanto (Léger-Albault)	30,00 F.
Dictionnaire pratique (Fr.-Esp. et Esp.-Fr.)	65,00 F.
Grand dictionnaire Esp.-Français (Waringhien)	75,00 F.
Lexique fondamental (Léger)	10,00 F.
Neologisma glosaro (Vatré)	22,00 F.
Oportuna vortaro de ordinara Esperanto	27,00 F.
Plena Ilustrita Vortaro (S.A.T.)	280,00 F.
Plena Vortaro kun suplemento (S.A.T.)	65,00 F.
Praktika bildvortaro (1500 terminoj)	40,00 F.
Vocabulaire Esperanto laùtema (Duc Goninaz)	15,00 F.

(A suivre)

GRAND SUCCES

de la quatrième édition de

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. BABIN

Illustré par L. Poueymarie.

« Vigla lernolibro por la praktikanto »

—

Prix inchangé : **25 F.** — Rabais habituel aux groupes et aux Libro-Servoj.

—

Commandes à : J. Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

VOUS NE POUVEZ PAS

suivre un cours oral dans votre ville ?

Pourquoi ne pas essayer nos

COURS PAR CORRESPONDANCE

POUR LES DEBUTANTS : 16 leçons illustrées avec de nombreux exercices. Permet d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : **120 F.**

COURS DE PRATIQUE : 14 leçons illustrées. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : **120 F.**

NIVEAU SUPERIEUR : versions thèmes, études de textes ; histoire de l'espéranto et du mouvement espérantiste. Cours et corrections : **90 F.** Notre Libro-Servo peut fournir les livres qui vous manquent.

***

Inscriptions et chèques à : Maison Culturelle Espérantiste, 49150 Baugé — C.C.P. Nantes 1485-39 P.

LIBRO-SERVO

Notre catalogue est à votre disposition. Nous vous le ferons parvenir contre un timbre-poste. Nous pouvons vous fournir tous les livres non épuisés et toutes les nouveautés.

Faites vos commandes sur lettre de préférence. Si vous êtes sûr du montant de la commande, joignez un chèque.. Sinon attendez la facture qui sera jointe à l'envoi.

N'oubliez pas que les envois se font **franco au-dessus de 200 francs.**

Adressez vos commandes à : J. VINCENT, B.P. 54, 49150 Baugé.

Intitulé des chèques : Maison Culturelle Espérantiste.